

Фёдор Сологуб,

## La disipanto

*tradukita de Michel Duc Goninaz*

Mi la korpon liveris al ŝimo,  
 Disipinte trezoron de l' sort'.  
 Jen mi staras ĉe la noktolimo  
 En nudeco, senhelpa, sen fort'.

Kaj mi petas de la Dia graco  
 — senkomparas la preĝa sincer'! —  
 “Nur iomon da forto donacu  
 Al mi, kiun lacigas la ter'.

Sub ĉi-teraj ĉagrenoj mi sklavas,  
 Por mi troas la tera plenum',  
 Sed printempoj min, ho kiom! ravas,  
 Kaj freŝigas min akva brakum'.

Kiom ruĝe aŭroroj ĉi ardas,  
 Kiel revas jasmena arbet',  
 Kiel milde lazuro rigardas,  
 Kiel kisas la lipa impet'!

Dezirata eĉ pli, ol kisado,  
 Kaj aroma eĉ pli, ol jasmen',  
 Estas forto de songa persvado  
 Kaj de versoj la milda refren'.

...

Ĉar Vi, Di', kompatemas, kaj vere  
 En Vi — gloro kaj fort', lumoflu'.  
 Donu iom da vivo surtere,  
 Por ke kantojn komponu mi plu!"

*Traduko de la Rusa poemo "Рассточитель" de ФЕДОР СОЛОГУВ (Fjodor Kusmiĉ Teternikov, \*1863-03-01 – †1927-12-05) en Esperanton de MICHEL DUC GONINAZ (\*1933-09.06) en 2003.*

*Arg-385-759 (2007-02-08 12:35:49)*

*Tiu ĉi traduko aperis en la revuo "La ondo de Esperanto", en 2003. Laŭ sciigo de s-ro Michel Duc Goninaz, la verkinto de tiu ĉi traduko, mi, Manfred Retzlaff, korektis preseraron en la tria stofo, nome "printempo" anstataŭ ĝuste "printempoj". S-ro Duc Goninaz atentigis min pri tio per retletero de l' 07.02.2007. Tiu preseraro ankoraŭ estis en la retejo <http://www.esperanto.org/Ondo/Ondo/106-lode.htm#106-36>, el kiu mi prenis la tradukon.*